

# Konkurso kaj kurso en Finnlando

## Tutmonda Esperanta Fabelkonkurso

La Tutmondan Esperantan Fabelkonkurson por infanoj ĝis la aĝo de 13 jaroj fondis nord-finna sinjorino Aini VÄÄRÄNIEMI en 2000. Dum la pasintaj 12 jaroj ne abunde venadis fabeletoj verkitaj de E-aj etuloj kaj geknaboj, entute 130 fabeletoj troviĝas en la arkivo, la premiitaj fabeloj kun finigoj. Unue aŭspiciis la konkurson UEA kaj la finna kultur-instituto Pääatalo en Taivalkoski (nomata laŭ amata nordfinna verkisto Kalle PÄÄTALO), sed nun la E-an konkurson daŭrigas la E-societo de la urbo Oulu. En la jaro 2012 al ĝi venis nur unu konkursaĵo, Ĉokolino, grupe verkita de kubanoj Juan, Marcos, Laura kaj Karlo. Espereble en 2013 denove venos pli multaj. La Tutmonda Esperanta Fabelkonkurso havas 4 kategoriojn: A: ĝis 9-jaruloj, B: por 10-11-jaruloj, C: 12-13-jaruloj; kaj la kategorio Grupoj. Oni juĝas la fabelojn laŭ la originaleco kaj ideoj, ioma lingva malperfekteco estas ne priatentata. La limdato estas 15.09.2013.

La fabelojn oni sendu al: *Esperanto-societo de Oulu, Vääräjärventie 26 A, FI-93590 Vanhala, Finnlando* aŭ rete al: *aini.esp@hotmail.com*.

Kiel trejnadon por fabelverkado oni povas legi aŭ almenaŭ okulumi esperantigitajn fabelojn ĉe: de *kunlaboro.pro.br/esperanto/fabeloj*. Kelkaj estas voĉaj kaj la plejparto ilustritaj.

La finnlingva fabelkonkurso, nomata Napero (humora finna vorto pri infanoj) grandas pli ol la E-a. En ĝia arkivo troviĝas kvin mil fabeloj, ĉefe de lernejoj, kiuj aĝas 6-13 jarojn. La premiofesto okazas ĉiujare ĉe Pääatalo-instituto en Taivalkoski la 18an de oktobro, kiu dato ĉe ni estas la festotago de Satu (finna knabina nomo, „fabelo”). La konkurson oni nun kandidatigis por la premio Astrid Lindgren. Ĉu vi rimarkis, ke kelkaj el la plej famaj fabeloj de tiu sveda verkistino aperis en E-o? Tio estas Pipi Ŝtrumpolonga, Fratoj Leonkoro, Emilo de Smolando.

En Taivalkoski viziteblas ankaŭ arbaro dediĉita al Zamenhof. Ĝi konsistas el grandaj maljunaj pingloarboj, kiuj kreas krepuskan fabelan etoson. Inter la arboj situas loko por kunkantado ĉe bivakfajro kaj fabeleca „Centra Officejo”. Sur kelkaj trunkoj pendas ŝildoj montrantaj la honoraton, kiu povas esti lando (e-istoj el diversaj mondanguloj vizitis) aŭ ideo (ekz. Paco, Amikeco) aŭ organizo (ekz. UEA). La arbaron posedas, protektas kaj al Zamenhof dediĉis s-ino Vääräniemi. Bonvenon al tiu fabela mondo en la Nordo.

*Raita PYHÄLÄ, Finnlando*

## Bonvenon en finna Somera Esperantokurso

Somera Esperantokurso en Finnlando okazos en Orivesi-instituto 8.–12.7.2013. La Instituto estas jam longe konata kiel kursejo kaj somere kaj vintre. La urbo Orivesi situas ĉe bonaj trafikvojoj, 45 km de Tampere kaj 109 km de Jyväskylä.

En la kurso instruos Dalia Pileckienė el Litovio kaj Sylvia Hämäläinen en du diversnivelaĵoj grupoj, daŭriga kaj elementa. Formiĝos tria grupo, se al la tuta kurso aliĝos sufiĉa kvanto da studentoj. Krom lecionoj ni havos diversajn programerojn, dum kiuj ni konatiĝos ekz.kun la cirkaŭaĵo, kantos kaj ludos. Kursokotizo estas 390 €, kiu inkludas instruadon, loĝadon kaj manĝojn (matemanĝo, lunĉo, kafo, verpermanĝeto). Krompago pri unupersona ĉambro estas 80 €. Aliĝo ĝis 14.6.2013. Se vi scipovas la finnan lingvon aliĝu rekte al Oriveden Opisto. Alikaze kontaktiĝu kun Tiina Oittinen, sekretario de EAF (E-Asocio de Finnlando), ĉar la oficistoj de la instituto ne scipovas E-on. Aliĝante informu en kiu grupo vi intencas partopreni. Pliajn sciojn vi trovas en [www.esperanto.fi](http://www.esperanto.fi). Kontaktiĝu kun Sylvia Hämäläinen pro iu ajn demando.

Kontaktadreso:

*Oriveden Opisto [www.orivedenopisto.fi](http://www.orivedenopisto.fi), [orivedenopisto@kvs.fi](mailto:orivedenopisto@kvs.fi), Koulutie 5, 35300 Orivesi tel. 020 7511 511*

*Tiina Oittinen [eafsekretario@esperanto.fi](mailto:eafsekretario@esperanto.fi), 050 549 4709 (de eksterlando +358 2 230 5319)*

*Sylvia Hämäläinen [sylvia.h@kolumbus.fi](mailto:sylvia.h@kolumbus.fi), F.E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere, tel. 050 321 4313 (de eksterlando +358 50 321 4313)*

*Sylvia HÄMÄLÄINEN*